MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 3

MARTO 2018 Kol. 395/34

xxxx

gastoj ni volonte helpos trovi la plej taŭgan trafikeblon. Ni antaŭĝojas, ke vi pligrandiĝos nian verdan familion.

Programo: Antaŭtagmeze lingvoinstruado kaj lingvo-praktikado diversgrada, post-tagmeze ekskursoj, promenoj, ripozo, manlaboraj atelieroj, vespera amuziĝo, kantado, ev. film-projektado.

Laŭinterese oni povas mendi kurac-procedurojn aŭ pruntepreni biciklon. *Unu el la ŝatataj ekskurso-celoj estas la proksima burgo Kost.*

Informoj: Jindřiška Drahotová, drahotova@esperanto.cz
tel. (+420)720 652 320.

Vojaĝo al Kostariko

Meze de decembro 2017 ni vojaĝis al Kostariko, kie ni pasigis unu monaton vizitante diversajn lokojn de la bela lando. Ĉi-foje ne temis pri iu Esperanto-evento, nia deziro estis koni tiun misteran landon, plenan de ekzotikaĵoj.

Kostariko, laŭ la traduko "Riĉa Marbordo" estas vere admirinda lando, situanta en Meza Ameriko. Norde ĝi limas kun Nikaragvo kaj sude kun Panamo.

Okcidente ĝiajn bordojn banas Pacifika oceano kaj oriente Kariba maro. Ĝi kuŝas en tropika regiono. La medio

rememorigis al ni Venezuelon, kie ni loĝis dum ses jaroj kun la diferenco pri pureco favore al Kostariko. La registaro kaj la popolo tre zorgemas pri la eko-sistemo. La lando apartenas al la plej disvolvitaj demokratioj en la mondo. Ĝi fariĝis la unua lando de la mondo, kiu nuligis armeon fine de la jaro 1948.

Vasta natura riĉeco karakteriziĝas de virga pejzaĝo, koloraj sablaj plaĝoj borderitaj per palmoj, nebulaj praarbaroj, densaj ĝangaloj kaj buntaj flaŭro kaj faŭno. Oni povas diri, ke ĝi estas paradizo sur la tero. Sur la teritorio de la lando troviĝas kelkdekoj da naciaj parkoj, multaj protektitaj lokoj, naturaj rezervejoj kaj ne mankas amaso da vulkanoj, sennombraj akvofaloj kaj kelkaj varmaj fontoj. La lando kuŝas en tektona zono, kie de tempo al tempo okazas tertremoj. En la oceano danĝeras fortaj kontraŭfluoj, pri kiuj la vizitantoj estas avertataj.

Kostariko havas proksimume kvin milionojn da loĝantoj. La plejmulto troviĝas en la ĉefurbo *San José* (Sankta Jozefo) kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Krom kelkaj koloniaj domoj, muzeoj, parkoj, placoj kaj la Nacia teatro nenio tre alloga troviĝas en la metropolo. Vizitanton povas interesi bazaro kaj la zoologia ĝardeno.
La oficiala lingvo estas la hispana, sed eblas interkompreniĝi per la angla kaj foje ankaŭ per la franca. Ofte mi devis diri hispane: "Kial vi alparolas min angle, se mi ne komprenas vin"? La lokanoj nomas sin "Tico" kaj ofte uzas la formulon "Pura

vida", kio povas signifi: "ĝoja vivo", "bonega vivo" aŭ simple "nur vivo". La kostarikanoj estas tre ĝentilaj, amikemaj kaj helpemaj. Se oni parolas hispane, ili tuj ekkonversacias kaj tiamaniere oni ricevas multajn informojn. Interesa rimarko estas, ke la libere promenantaj hundoj estas tre mildaj kaj tute ne agresemaj. Ili bojas nur inter si kaj eventuale postkuras motorciklojn.

La stabila politika kaj ekonomia prospero altiras plurajn eksterlandanojn instaliĝi en la lando. Elstaras la italaj kaj svisaj komunumoj. Ekzistas ankaŭ aliaj latinamerikaj grupoj. La sukceso en la ekonomio kuŝas en ĉiam disvolviĝanta turismo, eksporto de elektronikaĵoj, produktado kaj eksportado de kafo, sukero, ĉokolado, bananoj kaj aliaj tropikaj fruktoj. La kostarika kafoproduktado estas tre altkvalita. Ekzistas vastaj banan-, ananas- kaj sukerkanplantejoj. Ne mankas papajaj kaj mangaj plantoj kaj arboj, kokospalmoj. Tradiciaj produktoj estas kolorigitaj ĉaretoj kaj skulptitaj maskoj el balzo. Ili estas la plej malpeza lignaĵo.

Rilate la trafikon la plej konvena estas la aŭtomobilo. Ankaŭ per busoj eblas facile vojaĝi al diversaj interesaj lokoj. La vojoj ne estas ĉie bone prizorgataj. Ili estas polvaj kaj foje malfacile traireblaj. Por transportado ne mankas aviadil- kaj ŝip-rimedoj. Proksime al la strandoj oni ŝatas uzi kvarciklojn kaj sur la plaĝoj la promenantoj povas ĝui

ĉeval-rajdadon.
Ni traveturis Kostarikon de la nordo al la sudo ĝis la limo kun Panamo. Dum nia restado ni vizitis du esperantistojn, kun kiuj ni pasigis tre agrablajn tagojn. Ambaŭ rakontis pri sia inĝeniera studo en Moskvo kaj ĝis nun ili scipovas paroli la rusan lingvon. Krom ili la ceteraj homoj ne scias pri Esperanto. Do, mi kun plezuro donis informojn pri ĝi, eble ekĝermos intereso. Plurfoje ni renkontis indiĝenojn kaj en la vilaĝo *Boruca* ni spertis tritagan festadon de la nova jaro. Longe ni memoros pri la belaj travivaĵoj kaj neforgeseblaj momentoj, kiujn mi eternigis sur fotoj.

Liba Gabalda

Malkovru Portugalion

En Lisbono ni vizitos la 103-an Universalan kongreson de Esperanto de 28. 7. ĝis 4. 8. 2018.
Antaŭ ĉirkaŭ sescent jaroj, kiam portugaloj laŭ la oceanaj vojoj kontaktis aliajn kontinentojn, komenciĝis la Erao de Malkovroj, ekesto de tutmondiĝo. Nun la portugalaj esperantistoj invitas homojn de la tuta mondo malkovri Portugalion okaze de la mondkongreso en Lisbono.

Portugalio, la plej okcidenta lando sur la eŭropa kontinento, kun areo de 92 090 km^2 situas sur la Iberia duoninsulo kaj ampleksas ankaŭ du insularojn. Madejron kaj Acorojn. Ĝi estas la plej malnova naciŝtato de Eŭropo. En 1139 estis formita la portugala regno fare de Dom Afonso Henriques kaj ĝian sendependecon agnoskis la reĝoj de Kastilio kaj Leono en 1143. Ĝi limas norde kaj oriente kun Hispanio kaj okcidente kaj sude kun Atlantika

oceano. Ekde la pratempoj ĝin okupis diversaj gentoj kaj al tiuj aldoniĝis enmigrintoj de la diversaj ekskolonioj.

Lisbono ricevis urborajton de la roma imperiestro Julio Cezaro, kiu nomis ĝin Olissipo, kio poste iĝis Olispon, Ulishbon, alLixbůna..., ĝis la nuna Lisboa (Lisbono en Esperanto). Ĝi estas la ĉefurbo de Portugalio. Kun pli ol 500 000 loĝantoj ene de la urbaj limoj kaj pli ol 2 800 000 en sia metropola areo, ĝi estas la plej dense loĝata regiono kaj la plej riĉa urbo de la lando. Post la tertremo de la jaro 1755 ĝi estis komplete rekonstruita kun diversaj parkoj, placoj kaj rigardejoj.

Lisbono estas sekura kaj ĝia popolo afabla. La publika transporto kovras la tutan urbon per busoj, metroo, trajnoj kaj la simpatiaj trametoj (elétricos – elektruloj). La gastronomio en Portugalio estas altkvalita kaj varia, la restoracioj kun Michelin-steloj abundas en la lando.
Loĝeblecoj abundas en Lisbono, kun hoteloj kaj gastejoj por

ĉiuj poŝoj kaj ili kostas malpli kompare kun aliaj eŭropaj metropoloj. La plejmulto situas proksime de metroo kaj bushaltejoj. La temperaturo averaĝa en julio estas 25 gradoj tage kaj 18 gradoj nokte. La apudaj verdaj areoj plus la oceana brizo mildigas la plej varmajn tagojn.

La kongresejo okupos salonojn en la Rektorejo de la Universitato de Lisbono kaj de la Fakultato pri Juro. La metrohaltejo Cidade Universitária troviĝas kelkajn paŝojn for de la ejoj kaj

sep buslinioj kondukas al la universitato. Ĉiuj kunsidĉambroj estas klimatizataj.

Kaj nun, kion sciigas al vi la gvidantino de nia AEH-vojaĝo:

Por la nunjara 103-a Universala Kongreso en Lisbono aliĝis jam preskaŭ 1100 esperantistoj el 61 landoj de la mondo. El nia CZ respubliko amase veturos 30 personoj, pluaj eble veturos memstare. Por la komuna flugo mi jam certigis flugbiletojn kaj la tranoktadon ni havos en plej malmultekostaj pensionoj kaj tranoktejoj. La kongresan programon ĉiu ĝuos laŭ siaj interesoj, sed por la interesatoj mi preparis komunan trarigardon de la urbo Lisbono, kiun por ni certigos esperantistinoj el Prago. Pri la dato ni interparolos post la eldono de la Dua Bulteno.
Krom tio mi preparas la tuttagan ekskurson por merkredo, kiam la kongresejo estos fermita, por ĉiuj interesatoj ĝis la plena buso, kiu staros ĉe la kongresejo merkrede matene.

La ekskurson „al la fino de la mondo“ ni komencos en la fabela urbo Sintra, kiu troviĝas nur kelkajn kilometrojn de Lisbono, meze de eterne verdaj montetoj de la naturparko Serra de Sintra kaj Cascais. La terkapo Cabo da Roca estas la plej okcidenta sektera montarlango de la kontinenta Eŭropo. La rigardo al la vasta oceano el 140 metroj alta roko estas preskaŭ magia.

Tiu ĉi ĉarma loko estis la somera azilo de portugalaj reĝoj kaj nobeloj. Troviĝas ĉi tie ankaŭ du reĝaj palacoj kaj multe da imponaj, nobelaj domoj kaj pompaj restadejoj de artistoj, vojaĝemuloj aŭ vendistoj, kiuj ĉi tie restadis. La urbo estas notita sur la listo de la mondaj heredaĵoj de Unesko. Sintra estas konata ankaŭ pro siaj tipaj tradiciaj tortetoj el kapra fromaĝo, kiujn vi certe gustumos. Ĉe la fino de la ekskurso ni traveturos

laŭ la ĉarma marbordo de la lisbona riviero kun spirhaltigaj panoramoj ĝis la ĉemara somerejo Cascais. Ĉevoje ni povas malsekiĝi en la oceano.
Prezo: 30 eŭroj por persono (UEA organizas ekskursojn plej malmulte por 60 eŭroj). En la prezo estas buso por 8 horoj kaj ĉeĥe aŭ slovake parolanta gvidanto por 8 horoj. La prezo ne kalkulas enirojn al memoraĵoj, gustumoj, tagmanĝo.

Ekzemplo de tagmanĝo:
Hejma pano, freŝa fromaĝo, vianda kaj fiŝa kroketoj, porkido kun pipra saŭco, terpometoj, salato, deserto, akvo, vino, kafo – la prezo 16 eŭroj/persono.

ATENTU:
Ĵuste por certigi la tagmanĝon kaj lokojn en la buso mi bezonus scii la nombron de la interesatoj krom nia grupo, kiuj jam aliĝis al mi. Tial mi petas ĉiujn interesatojn aliĝi pri nia tuttaga ekskurso ĝis la fino de aprilo.

Lenka Angelová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.